



Komencanto

10 jaroj kune kun vi!

1998-2007

Redakcia artikoleto

Foliumante malnovajn
numerojn:

Elektitaj verkoj el komencaj
jaroj, omaĝoj al la aŭtoroj

Novaj kontribuoj por
la rubrikoj

Kiel tio komenciĝis
Rakontas Probal Dasgupta
- prezidanto de UEA

Verkoj de niaj legantoj
Vintra poezio
Orienta fabelo

Diversaj ondoj el bunta
mondo
Vojaĝo al klubkunveno

Gramatiko serioze kaj
ŝerce
J-L Tortel
gramatikaj lecionoj 14-15

Humuraj paĝoj
El la vivsperto de unu patrino
Anekdotoj

Korespondu!

Bildo de Vinnikova Nina [Novoaltajsk, Rusio]



Ni veturas — aventuras, la ĉevaloj fluge kuras

Sub la stela miriad'!!!

(el "Vintra fabelo" de N. Hoblov)

internacia revuo por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj

2007

decembro

5-6 (67-68)

10 jaroj kune kun vi!

Karaj legantoj!


Vivo kaj jaroj flugas tre rapide, same kiel ĉevaloj de ĉi-numera kovrilpaĝo. Kaj eĉ ne tre kredeblas, ke pasis jam 10 jaroj de la revuedaktado kaj eldonado. Tamen, ĉi-numero finas la dekjaran eldonperiodon. Ĝuste tial ni kunigis la numerojn 5 kaj 6 de 2007, por fari iusence jubilean kajeron kun retrospektiva trarigardo de interesaj publikaĵoj de antaŭaj jaroj (ili estis elektitaj plejparte el la komencaj tri jaroj - tiujn plejverŝajne legis ne tre multaj el nunaj abonantoj). Ĉi tie ni dezirus per plej varmaj vortoj danki niajn fidelajn aŭtorojn, sen kies kontribuoj la revuo simple ne imageblas.

Ekde la apero "Komencanto" havas la ĉefajn celojn: aktivigi esperantistojn, komencantajn kaj spertajn, por praktika uzo de Esperanto, kuraĝigi novulojn por partopreno en la movadaj aferoj. Krome, ekde la komenco la revuo estas provo elvoki ĉe la legantoj deziron krei memstare: ion traduki aŭ eĉ originale verki en diversaj ĝenroj, prozaj kaj poeziaj, seriozaj kaj humoraj. Kiel atesto de tio, ke tiu ĉi provo sukcesis, estas multaj kontribuoj, faritaj por la revuo dum 10 jaroj, multaj novaj aŭtoroj, malkovritaj pere de "K".

Ni ĝojas, ke sur la paĝoj de la revuo ni "renkontiĝis" kaj konatiĝis kun tiuj, kiuj subtenis la ideojn de "K", konsistigis nian propran rondon de samideanoj kaj fariĝis fidelaj legantoj, kontribuantoj, amikoj por multaj jaroj. Tio estas Bill Thorne (Anglio), Ludmila Leksina (Rusio), Martin Ginette (Francio), Zujeva Margarita (Rusio), Santi Elena Bullo (Italio), Igorj Belousov (Rusio), Raita Pyhälä (Finlando), Vladimir Opletajev (Rusio), Jürgen Kloker (Germanio), Sergej Paĥomov (Rusio), Ĵan-Luk' Tortel (Francio), Aleksas Masiukas (Rusio), Dorotea kaj Hans-Georg Kaiser (Germanio), Micuko Itabaŝi (Japanio), Anton Loŝmanov, Tatjana Vŝivceva, Viktor Alikin, Nikolaj Neĉajev, (Rusio) kaj multaj-multaj aliaj. Kun malĝojo ni rememoras tiujn el niaj fidelaj

aŭtoroj, kiuj dum dekjara periodo forlasis nian vantanon kaj publikaĵoj de iliaj verkoj ĉi tie nun estas niaj modestaj omaĝoj al ili.

Aparte ni dankas ĉiujn niajn desegnistojn, kiuj per siaj bildoj plibeligis paĝojn de la revuo, faris ĝin ne enua.



Ĉi tie ni nomas nur kelkajn, kiuj kontribuis plej ofte: Nina Vinnikova, Snejana Kononova, Naila Sadretdinova, Jurij Perevalov, Anna Kornjuhina, Galina Vŝivceva, Timur Halilov, Marija Terjohina, Daŝa Dalmatova, Aleksandr Ŝulepov kaj aliaj.

Ni ĝojas, ke dank'al unika eltrovaĵo de "K" - rubriko "Kiel tio komenciĝis" - ni havis eblecon konatiĝi kaj komunikiĝi kun interese-gaj elstaraj personoj de nia Esperanto-mondo. Ni dankas ĉiujn eminentulojn, kiuj afable reeĥis al nia propono skribi por "K" kaj esperas, ke historioj de ilia esperantistiĝo, postaj aktiva E-agado kaj atingoj sur E-kampo estis ne nur interesaj, sed utilaj por la legantaro, instigis la novulojn esti pli aktivaj kaj entuziasmaj, montris sencon engaĝiĝi en E-movadon.

Dum la tuta eldonperiodo la revuo penis ankaŭ klerigi komencan-

tojn, rakontante pri historio de E-literaturo, pri diversaj E-periodaĵoj, pri multaj E-organizaĵoj, pri Pasporta Servo ktp. Ĉiam ekzistis gramatika rubriko kun propono de tre variaj materialoj, tio povis esti iuj amuzaj taskoj por ekzerci la lingvoscion, unuopaj vizitoj gaste kaj kontribuoj de E-eminentuloj, materialoj proponitaj flanke de la legantoj. Dum pli ol du jaroj la gramatika rubriko havas konstantan aŭtoron - Ĵan-Luk Tortel, al kiu la redakcio estas tre danka pro originalaj materialoj, kiujn ni mem ĉiam atendas kun granda intereso kaj plezure legas. Ni esperas, ke ili iam aperos libroforme kaj portos veran vastan rekonon al la aŭtoro, kiu sendube meritas tion.

Ni ĉiam diras, ke "Komencanto" estas rezulto de niaj kunaj streĉoj, ĉar ni faras ĝin kune kun vi, karaj legantoj! Post la dekjara laboro ni povas konklude konfesi, ke eldoni revuon ne estas facila afero kaj sur tiu ĉi malfacila vojo ni renkontas multajn obstaklojn kaj malfacilaĵojn, kaj nur viaj komprenemo, helpemo, subteno donas al ni fortojn daŭrigi la aferon. En 2008-a la redakcion promesis subteni per konkreta helpo estraro de REU (Rusia E-Unio). Ni restas esperplenaj, ke tio iom faciligos la laboron, pozitive ŝanĝos la eldonkondiĉojn kaj ni rekaptos normalan eldonritmon. Ni ŝatus fini tradicie, per la Zamenhofa slogano: "Ni laboru kaj esperu!"

P.S. Laŭ iu koincido 2007-a iĝis por la redaktoro de "K" jaro de rondaj datoj: 50-jara jubileo de la redaktoro mem, 30-a datreveno de lia esperantistiĝo kaj 10 jaroj al "Komencanto". Ŝajnas, tio rajtigas komenci la retrospektivan trarigardon per rakonto pri la esperantistiĝo de Viktor Kudrjavcev, sed certe ĉi-foje la artikolo havas aldonojn, ĉar vivo plenigas la memoron per novaj rememoroj.

Fondinto kaj redaktoro de "Komencanto"

Esperanto estas ne nur lingvo, sed granda, varia, multkolora, mirinda kaj neripetbla mondo!

Mia unua scio pri Esperanto estis negativa: infanaĝe mi legis en iu libro, ke Esperanto estas "mortnaskita lingvo, destinita al fiasko".

Komenco de mia konatiĝo kun Esperanto rilatas al 70-aj jaroj, kiam estinte studento de Politekniko, mi frekventis la urban bibliotekon pri fremdaj lingvoj por okupiĝi pri la angla (tiam modo de multaj studentoj) Foje en la salonon venis homoj, kiuj anoncis pri okazonta prezento kaj unua leciono de Esperanto. Mi certe miris, ke la "mortnaskita" lingvo tamen vivas kaj ekinteresiĝis. Evidente la prelego impresis min, ĉar mi decidis nepre ellerni Esperanton, "tiom facilan lingvon", des pli, ke la angla malbone enkapiĝis.

Ekde la komenco de lernado Esperanto plaĉis al mi, ĝi estis kvazaŭ facila rebuso, kie oni povas montri lertecon de sia intelekto. Mi volonte vizitis la lecionojn.


Post fino de la elementa kurso oni proponis al mi viziti SEJT*. Tiusomere, en 1976, ĝi okazis apud urbo Tiĥvin, en Leningrada regiono. En pitoreska arbaro kaj preskaŭ sovaĝa naturo kolektiĝis ĉirkaŭ 300 personoj, reprezentantoj de diversaj urboj de la tuta grandega Sovetunio. Plezure pasiginte miajn somerajn feriojn en mirinda E-kompanio, mi serioze kaj por longe "infektiĝis" kaj engaĝiĝis en E-movadon. Kiajn belajn revojn donacas la juneco kaj kiun agavidon mi havis tiam!

Reveninte hejmen mi tuj organizis E-kurson, malgraŭ, ke ne povis flue paroli kaj tute ne sciis instrui! La sorto decidis min ekzameni - kun mia E-grupo mi vizitis regionan E-renkontiĝon kaj dum solena malfermo la organizantoj invitis min al mikrofono por salutparoli. Mi ĝis nun memoras tiujn dudek paŝojn al la mikrofono - ili estis por mi kvazaŭ paŝoj al la eŝafodo! En mia cerbo frapis: "Post kelkaj sekundoj miaj gelemantoj ekvidos, ke ilia instruisto ne scias flue paroli! Terure!!" Eble pro tia nervostreĉo okazis tute male — mi prenis la mikrofonon kaj improvizis tute fluan salutparolon, ke oni eĉ aplaudis!

Tiel startis mia aktiva esperantista vivo. Mi partoprenis regionajn E-renkontiĝojn kaj somerajn E-tendarojn, iĝis prezidanto de E-klubo, mem organizis E-aranĝojn, komencis internacian korespondadon... Al miaj unuaj 30 leteroj rehis nur 6 personoj, sed mi ĝojas kaj dankas la sorton, ke inter ili estis Ralf Jalming el Goteborgo, Svedio, kun kiu ni amikas jam 30 jarojn!

Mia unua internacia aranĝo estis TEJO-kongreso en Krakovo kaj la vojaĝo en Pollandon en 1987 (kiam Esperanto havis 100-jaran jubileon) estis mia unua eksterlanda vojaĝo. Min tiam tre impresis la fakto, ke 1000 partoprenantoj el 50 landoj tute libere interparolis kaj komprenis unu la alian sen tradukistoj!

SEJT – Sovetia Esperantista Junulara Tendaro



Aparta direkto de mia E-agado estis koresponda esperanto-kurso. Mi publikigis centojn da artikoloj pri Esperanto en gazetaro tra la tuta lando, rezulto de tiuj publikaĵoj estis centoj da korespondaj kursanoj. La kurso funkciis preskaŭ 20 jarojn! Ĝuste por tiuj korespondaj kursanoj estis elpensita kaj farita modesta bulteno sub la titolo "Komencanto", kiu dum dek jaroj kreskis el "gazeto por korespondaj kursanoj..." al la "internacia revuo por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj", kiun vi legas nun.

Cetera mia intereso pri Esperanto ne estingiĝis ankaŭ dum la jaroj de mia armeservado. Mi devas rakonti pri kurioza okazo kiam mi tiam (tute senpermesite) forlasis la servadon por almenaŭ dum kelkaj tagoj partopreni la vican SEJT-on, kiu okazis tiusomere en Uzbekio, apud urbo Taŝkent. Nun jam mi komprenas, ke tiam mi simple haste veturis al la grava vivevento, ĉar ĝuste tie mi konatiĝis kun mia estonta edzino, juna kaj entuziasma Raja – aktivulino de E-klubo el Samarkand. Nun ni estas E-familio kaj daŭrigas E-aktivi kune, redaktante kaj eldonante la revuon, okupiĝante pri la lingvoinstruo, organizante regionajn renkontiĝojn, partoprenante UK-ojn kaj aliajn internaciajn aranĝojn ktp.

La vivrado moviĝas kaj ni esperoplene "semas kaj semas" sur E-kampo, sekvante sloganon de Zamenhof: "Ni laboru kaj esperu!" Ĝuste sub tiu titolo la revuo Esperanto (№11-2002) aperigis artikolon pri ni kaj nia agado. Kiel redaktoroj de internacia revuo ni estis oficiale invititaj kaj partoprenis en 2005 la 92-an Japanan E-kongreson en Jokohamo, kie ni prezentis rezulton de niaj komunaj streĉoj kaj penoj - "Komencanton" - al la japana esperantistaro.

Karaj komencantoj! Esperanto estas ne nur lingvo, sed granda, varia, multkolora, mirinda kaj neripetbla mondo! Ĝi sendube pliriĉigas vivon de ĉiuj, kiuj trafas kaj restas en tiu mondo! Mi deziras al vi ĝui la vivon de tiu ĉi mondo!

Norvega E-aktivulo kaj aŭtoro, kiu kontribuis por multaj E-periodaĵoj, sendis al "Komencanto" tiun interesan rakonton pri sia sperto de uzado de *Pasporta Servo*.

Bård Hekland [Norvegio]
el "K"-7-1999

Eta rakonto pri utilo de Pasporta Servo

Vojaĝante, unu el la praktikaj problemoj estas trovi malmultekostan tranoktadon. Alia defio estas kiel konatiĝi kun lokuloj survoje. Post la lasta *Internacia Seminario* en Germanio mi fruvespere alvenis en Budapeŝton. Pro fervoja striko ne eblis plu veturi al Agard, kie atendis min komencanta grupo. La lasta aŭtobuso jam forveturis. Mi sentis min iom perdita en la fremda urbego.

El la dorsosako mi prenis la *gastigantliston de TEJO*, trafoliumis al la hungaraj paĝoj kaj ektelefonis de surstrata budo. Jam krepuskis. Respondis voĉo hungarlingva. Sed ne vivanta homo, nur iu aŭtomata mesaĝo estis laŭtleĝata. Tio ripetigis. Dufoje. Trifoje. Foje neniu respondis. Mi tempon malŝparis. Ĉu vere ĉiuj esperantistoj en la urbo translokiĝis?

Mian senĉesan telefonadon rimarkis promenanta junulo. Alvokinte la informtelefonon, li sciigis min, ke granda parto de la abonantoj antaŭnelonge ricevis novajn numerojn.

Do, solviĝis unu enigmo. Sed la problemo ne solviĝis. Jam estis la deka kaj verdire tro malfruis por iun ĝeni. Tamen mi provis lastan fojon – kaj sukcesis. Duonhoron poste min renkontis ĝentila mezaĝa fraŭlo kaj ni kune iris al lia loĝejo. Li estis instruisto pri la rusa, sed tiun laboron oni ne trovas en nuna Hungario. Sidante en la kuirejo, ni vigle interparolis, li min enkondukis en la armenan skribon, kiu nun okupis lian liberan tempon. Vere strangas tiuj signoj!

La venontan matenon mi vekigis refreŝigita kaj ĝuis la vidindaĵojn de Budapeŝto antaŭ ol forveturi.

Pasporta Servo ne estas mirakla savilo. Ofte okazas, ke mankas gastiganto por la urbo, kiun vi decidis viziti, aŭ evidentiĝas, ke la gastiganto nekontentige regas la lingvon. Sed kun iom da antaŭpreparado (neniam sekvu mian ekzemplon, donu ĉiam anticipan anoncon!) vi ricevas interesan kaj senkostan tranoktadon. Eble ankaŭ vi ŝatos fariĝi gastiganto (kaj samtempe ricevi la *Liston*?) Se tiel – vi kontaktu la *Centran Oficejon de UEA*. (www.uea.org)

Se via nomo aperos en la listo, eble iun tagon telefonos al vi ĝuste mi!

Do, ĝis la revido!



Bill Thorne [Britio]

Ekskurso

el "K"-2000-7

Unu familio decidis ekskursi al Francio, ĉar ili neniam estis tie.

Post la vojaĝo ili venis en Parizon kaj eniris restoracion.

Aperis kelnero kiu demandis: "Bonjour, m'sieur-dame! *Quelleque chose pour boire, ou pour manger?*"

Nu, Paĉjo jam ricevis modernan klarecon, do li nur povis respondi:

— Kion?

Panjo koleris pro tiom publika parado de malklereco. Ŝi riproĉis lin:

— Ĉu kompreneblas, ke kiam oni eniras restoracion, kelnero venas kaj demandas "Kion vi volas?" Ŝi daŭrigis: "Ni devos lerni la lingvon". Al mi ŝajnis, ke lerni la germanan lingvon estus bone, do, dum la sekvintaj kvar jaroj la tuta familio diligente studis ĝin, la gepatroj kaj la du infanoj kune.

Unu tagon la Panjo ĝoje anoncis: "Mi mendis belan ferion alilande."

— Bonege! Kien, kien? — ekkriis la infanoj.

— Mi volas, ke tio estu surprizo, - diris la Panjo, — sed la nomo de la lando komenciĝas de litero "G".

— Ho, Germanio! Germanio! — ekkriis la infanoj.

— Fakte ne, - diris la Panjo. — Estas Grekio.

Tiuj du kontribuoj rakontas pri du belegaj urboj de la mondo – Venecio en Italio kaj Gotenburgo en Svedio, kiun mem svedoj nomas "norda Venecio". Ambaŭ rakontoj estis verkitaj kun granda amo kaj publikigitaj en "K" en diversaj jaroj.



Gotenburgo – urbo de UK-88

Ralf Jalming [Svedio]
el "K"-2003-3

Gotenburgo estas la urbo kie okazos la ĉi-jara Universala Kongreso kaj bonvenigas ĉiujn kongresanojn. La urbo situas ĉe la okcidenta marbordo de Svedujo ĉe la rivero Gota kaj

estas la dua plej granda urbo de Svedujo kun ĉirkaŭ 450.000 da loĝantoj. La urbo estis fondita en 1621 de la reĝo Gustav II Adolf. Nederlandanoj helpis konstrui la kanalojn en la urbo, kaj germanoj kaj skotoj multe kontribuis en la konstruado. Ĝi estas grava industria kaj komerca urbo en suda Svedujo. Antaŭe ĝi havis plurajn grandajn ŝipkonstruejojn sed nuntempe nur malgranda parto restis de tio. La komerco kun aliaj landoj ĉiam estis granda kaj diversaj ŝipoj foriris kaj alvenis de ĉiuj partoj de la mondo. Estas vaste konata la granda aŭtofabriko "Volvo" kaj ekzistas ankaŭ aliaj specoj de industrio. La urbo havas universitaton kaj aliajn altlemejojn, ekzemple la teknikan altlernejon Chalmers. Oni nomas Gotenburgon urbo de la donacintoj. Pluraj riĉaj urbanoj donacis monon al lernejoj, hospitaloj kaj urbaj institutoj kaj tiamaniere kontribuis al la ĝenerala prospero.

Dum la granda elmigrado al Usono 1850-1920 pli ol unu miliono da homoj foriris de la lando tra Gotenburgo al la atendantaj ŝipoj.

En la urbo estas multaj diversaj muzeoj, inter ili estas la arta muzeo, speciale vizitinda kun multaj reprezentantoj de epokoj kaj stiloj, svedaj kaj alilandaj. Pluraj teatroj, koncerthalo kaj bibliotekoj zorgas pri la kultura vivo. Grandaj kaj malgrandaj parkoj donas eblecon por promenadoj kaj ripozo. Iom for de la centro estas interesa botanika ĝardeno kun diversaj tipoj de arboj kaj plantoj.

La granda amuza parko "Liseberg" estas unu el la plej grandaj en Skandinavio kaj estu nepre en la programo de la vizitanto. La urbo ne havas metroon, sed havas bonan trafikan sistemon pere de tramoj kaj aŭtobusoj. La ĉirkaŭaĵoj de Gotenburgo estas vizitindaj. Ekster la marbordo estas arkipelago, kie la ventoj ofte estas fortaj kaj la okcidenta maro ĵetas siajn ŝaŭmantaj ondoj kontraŭ la klifoj.

Gotenburganoj estas konsiderataj kiel ŝercemaj homoj kaj du simbolaj figuroj de la urbo nomiĝas *Kal* kaj *Ada* pri kiuj oni rakontas ŝercajn historiojn. Jen unu:

Ada diras al Kal:

— Mi legis en libro ke ekzistas sovaĝuloj, kiuj vendas siajn edzinojn.

Ĉu vi povus fari tion?

— Absolute ne, mi fordonus vin senpage!

Santi Elena Bullo [Italio]
El "K"-2001-8

Venecio

Estas mia urbo-konko
El ŝtonoj kaj oro
Kiun ĉirkaŭbrakas
Kvieta verda akvo.
Kiam brilas la suno
Briliĝas la laguno
Per mikraj lumoj.
Sed kiam naskiĝas la luno
Ĉion mirinde ĝi kaŝas
Per blanklakta koloro.
Tiam al vi ŝajnas vivo
En senvorta revo.



Santi Elena Bullo [Italio]

Espereble, ke kelkaj originale verkitaĵoj aŭ tradukitaĵoj diversĝenraj kontribuoj de la aŭtoroj, retrospektive elektitaj el "Komencanto" de antaŭaj jaroj plezurigos vin per sia agrabla milda humuro.

Ludmila Leksina [Rusio]

Kiu formanĝis karotojn?

el "K"-1-2000


Mia onklino havis malgrandan legomĝardenon. Foje ŝi rimarkis, ke malaperis kelkaj karotoj. Restis sur tero nur karotaj folioj. Strange! Ĉirkaŭe estis forta barilo, interne estis fidela gardhundo Murza.

La onklino vokis Murza'n, montris la karotojn kaj diris: "Gardu, Murza, gardu!"

La hundino rigardis per siaj saĝaj okuloj kaj svingis la voston. Sed la karotoj denove malaperadis... Finfine restis nur kelkaj karotoj.

La onklino malgaje rigardis en la fenestron kaj subite ekvidis, ke Murza venis al la karotoj, elŝiris unu karoton kaj apetite formanĝis ĝin. Jen kiu estis la ŝtelisto!

Multaj hundoj ŝatas manĝi legomojn kaj dolĉajn fruktojn. Foje mi vidis hundon, manĝintan frambojn. Mia hundino Rema precipe ŝatas manĝi kukumojn. Kaj eĉ najbara hundo ŝtelas falintajn dolĉajn pomojn el mia ĝardeno.



Nadejda Lojĵina [Glazov, Rusio]

Oksana Burkina [Sibirskij, Rusio]



Aleksas Masiukas [Murmansko, Rusio]

litova popola fabelo

Kial katoj lavas sin post manĝo

el "K"-5-1998

La paseroj flugas ĉirkaŭ la domoj ĉar en la kortoj ĉiam trovebas paneroj aŭ greneroj, kiujn ili ŝatas manĝi.

Foje saltetis pasero en la korto, serĉante ion por manĝi. Ĝi estis tute trankvila kaj senzorga. Sed ekvidis ĝin malsata kato, kaŝe alproksimiĝis, eksaltis kaj kaptis ĝin.

— Nun mi bone lunĉos.

— Kion vi diras, altestimata kato? — ekpepis la timigita pasero. — Ĉu vi vere intencas formanĝi min?

— Kial do ne? — Ĉu mi devas nur admiri vin eĉ kiam mi estas malsata? — kaj la kato pretis deŝiri la kapon de la pasero.


— Ĉu vi ne hontas, altestimata kato? — denove ekpepis la pasero. Ja vi ankoraŭ ne lavis vin. Ĉu vi, kiu vivas kune kun la homoj, ne scias, ke ĉiu civilizita homo unue lavas siajn manojn kaj poste manĝas?

— Ho, jes, tio estas vero. — respondis la kato kaj levis la piedeton por viŝi sian buŝon.

La pasero tiumomente eksentis sin libera, etendis la flugilojn kaj forflugis. La kato kolere ekkriis:

— Ho, la duan fojon vi ne trompos min. Faru la homoj kiel ili volas, sed mi unue manĝos kaj poste lavos min.

Ekde tiam ĉiu kato lavas sin post manĝo.



Bill Thorne [Londono, Britio]

Tiuj ĉu du negrandaj sed ĉarmaj verkoj, originala kaj tradukita, ankaŭ aperis en diversaj jaroj, sed ilin unuigas la sama temo.

Florian nad Metuji [Nederlando]

Lirike

el "K"-7-1999

Mi trikas longajn, plurkolorajn, dikajn ŝalojn el artlano. Mi donis unu al junulo kiu sidis en la Anemono-strato sur la trotuaro. La junulo ludis gitaron kaj kantis, lia kaskedo kuŝis renversa antaŭ li, preterpasantoj metis en ĝin monerojn. Mi demandis al la junulo, ĉu li volas akcepti de mi trikitan ŝalon. Li diris "jes" kaj tuj volvis ĝin ĉirkaŭ la kolo, li ne estis varme vestita.

"Ĝuste tio, kion mi bezonis", - li diris ĝoje. Poste li ekstaris kaj brakumis min, mi frapis lian ŝultron. Li havis honestajn, bluajn okulojn. La junulo rakontis, ke lia patrino havas naskiĝtagon, mi bondeziris al ŝi. Li diris, ke li kredas je Dio, mi konfesis, ke ankaŭ mi.

el Rabindranath Tagore esperantigis Ginette Martin [Francio]

Doni

el "K"-7-2000

Mi estis irinta almozetante de pordo al pordo, laŭ la vilaĝa vojo, kiam via ora ĉaro aperis malproksime, simile al belega revo; kiam mi admiris, kia estas tiu reĝo de ĉiuj reĝoj. Miaj esperoj pli grandigis, kiam mi pensis: "Finitaj estas por mi la malbonaj tagoj". Kaj mi jam prepariĝis, atendante spontanajn almozojn kaj riĉaĵon, ĉie disĵetatajn en la polvon.


La ĉaro haltis ĉe la loko, kie mi estis. Via rigardo falis sur min, kaj vi elĉariĝis kun rideto. Mi sentis, ke la ŝanco de mia vivo estis venanta – tiam subite vi antaŭenmetis la dekstran manon kaj diris:

— Kion vi havas por doni al mi?

"Ha! Kia reĝa ludo estas tio, etendi la manon kaj almozeti ĉe la almozetanto?"

Mi estis konfuzita, kaj embarasita. Finfine, el mia sakaĉo, mi malrapide tiris etetan grajnon de tritiko, kaj mi donis ĝin al vi. Sed kiom granda estis mia surprizo, kiam tagfine, malplenigante mian sakon sur la teron, mi trovis etetan grajnon de oro inter la amaso de mizeraj grajnoj. Mi amare ploris kaj pensis:

"Kial mi ne havis koron por doni ĉion?"

Jurij Perevalov.
[Lesnoj, Rusio]


Carmen Llapart [Figueras Hispanio]

Kononova Snejana
[N.Omka, Rusio]

Rideto

el "K"-4-2000

Rideto kostas nenion kaj multe valoras.
 Ĝi riĉigas tiujn, kiuj ĝin ricevas,
 sen malriĉigi la donintojn.
 Ĝi daŭras kiel spiro,
 Sed ĝia memoraĵo iĝas eterna.
 Neniu estas sufiĉe riĉa por subestimi ĝin.
 Ĝi feliĉigas hejme, apogas negocojn.
 Ĝi estas sentiva signo de amikeco.
 Rideto ripozigas laculojn,
 donas bravecon al malkuraĝuloj.
 Ĝin oni nek aĉetas, nek pruntedonas, nek ŝtelas,
 do estas io senvalora,
 ĉar ĝi estas donaco.
 Kaj, se foje vi renkontas homon, kiu ne scias rideti, estu malavara, donu al li la vian, ĉar despli bezonas rideton tiu, kiu ne povas doni ĝin al aliuloj.



Rudolf Zoldoŝ [Kabjiza, Jugoslavio]

El la vivo de soldatoj kaj generaloj

Nur mallonge...

el "K"-7-2000



Al generalo oni komandis novan soldatserviston. La altranga oficiro komandvoĉe instruis lin:
 — Ĉiam mallonge, akurate! Mi ne ŝatas multe babili. Kiam mi diros: "Ellitiĝo!" – vi komprenu, ke mi bezonas akvon por lavi min, sapon kaj razilon por razi min kaj la uniformon por vesti min. Nur mallonge! Ĉu vi komprenas?
 — Jes, mi komprenas!
 Iun tagon la generalo longe dormis kaj kiam lia soldato vekis lin, li duondorme diris al li:
 — Mi malsanas.
 — Jes, mi komprenas, sinjoro generalo, vi malsanas. Kaj li rapide forlasis la ĉambron. Post duonhoru li revenis kaj raportis al la generalo, kiu jam sidis ĉe la tablo kaj bonapetite matenmanĝis:
 — En la antaŭĉambro atendas kuracisto, pastro, tombejoficisto kaj viro el la enteriga servo...

Kornjuhina Anna [Barnaul, Rusio]

* * *

Instigi komencantojn al la praktiko - ĉiam estis unu el direktoj de la revuo, kaj tiucele ni proponis diversajn taskojn, kiuj kaj amuzis kaj samtempe trejnigis la legantojn en la lingvo-uzo kaj verkado.

El popola cerbo venas la proverbo

Tiu ĉi ekzercio estas bazita sur proverboj. Sube vi trovos la unuajn duonojn de konataj proverboj. Via tasko estas elpensi la finojn de la proverboj.

Ekzemple: **Sen laboro ne venas oro.**

Variantoj: Sen laboro *enuas koro*. Sen laboro *ne venas honoro*.

La tasko mem estis publikigita en "Komencanto"-2001-2. Pli poste en "K" ni aperigis proverbajn variantojn, senditajn responde al la taskoj.

Sergej Paĥomov [Rusio]

Respondoj – finoj de la Z-proverboj

Komenca parto de konata proverbo	Novelpensita fina parto
Ne doloras frapo	se sub kasko estas kapo.
Ne ŝovu nazon	en Esperanto-bazon.
Tempo estas valoro	ne tro rapidu la koro!
La dorm' estas bona	sen son' magnetofona.
Kiu frue leviĝas	por dormuloj obstaklo iĝas.
Inter generaloj	ĉiam estas por milito kialoj.
Ŝatata laboro	estas lav' de oro.
Komenco bona	enhavo monotona.
Vigla saĝo	kondukas al kaĝo.
Al ĉiu besto	necesas karesa gesto.



Svetlana Naumoviĉ [Rusio]

En "Komencanto"-1998-2 ni proponis al la legantoj provi verki rakonton, kies vortoj komenciĝis je unu sama litero. Tiaj rakontoj estas amuzaĵoj kaj fakte eĉ en la naciaj lingvoj estas malfacile verki similajn tekstojn. Tamen niaj legantoj bone plenumis la taskon en Esperanto kaj sendis al ni siajn provojn.

Ĉi tie vi povas legi unu el tiaspacaj rakontoj, kies ĉiuj vortoj komenciĝas je la litero K.

Aleksandr Nasonov [Rusio]

Konkurso kantista kaj kuirista

el "K" – 2 -1999

Kastela korto. Kreskas kverko. Komenciĝas krepusko. Knabo kerol kaj knabino Kristina kantante kanzonojn kuraĝe konkuras. Knabino Kristina kantas karese kaj kviete, kiel kolombino, knabo Kerol krias kvazaŭ kolera koko. Koncerto!

Kamaradoj Kozin, Kuzin kaj Kulova konsideras kaj kontrolas komplikajn konkurson kaj kantistajn kapablojn kaj kalkulas.

Knabino Kristina kuiras kukojn kun kakao. Knabo Kerol klopodas kuiri kaĉon kaj kafon. Kompetenta komisiono kalkulas, kies kuiraj konvenas kaj konkludas Kristinajn kukojn kiel konvenaj.

Knabo Kerol klinas kolon kaj kaŝas kapon. Komisiono kaj kamaradoj konsilas konsoli kaj kisi kompatindan knabon. Kristina kore kisas Kerolon kun kareso.

Jen por (re)lego kelkaj materialoj senditaj de la legantoj kaj divers-tempe aperigitaj sur gramatikaj paĝoj de "K"

Inga Johansson [Goteborg, Svedio]

Amuza Alfabeto

el "K"-7-1999

A – kiel afabla avo en Armenio
 B - kiel blua botelo en Bulgario
 C – kiel cigareda cindro en centra Afriko
 Ĉ – kiel ĉefa ĉambro en Ĉeĥio
 D – kiel dolora dento en Danlando
 E – kiel erara edzo en Ekvadoro
 F – kiel flava fromaĝo en Finnlando
 G – kiel gaja gasto en Grekio
 Ĝ – kiel ĝentila ĝemelo en Ĝibutio
 H – kiel helpema homo en Hungario
 Ĥ - kiel ĥaosa ĥoro en Ĥarkovo
 I – kiel interesa insulo en Indonezio
 J – kiel juna jaguaro en Jamajko
 Ĵ – kiel ĵaluza ĵurnalisto en Ĵurazo
 K – kiel kuranta kato en Kanado
 L – kiel longa lito en Luksemburgo
 M – kiel memorinda monto en Maroko
 N – kiel neĝa naturo en Norvegio
 O – kiel ordinara oranĝo en Oceanio
 P – kiel ploranta policisto en Portugalio
 R – kiel ruĝa robo en Rumanio
 S - sola sinjoro en Svedio
 Ŝ - kiel ŝerca ŝejko en Ŝanhajo
 T – kiel trankvila trajno en Tanzanio
 U – kiel unua urso en Usono
 V – kiel verda vilaĝo en Vjetnamio
 Z – kiel zorgoplena zebro el Zambio




**Jurij
Perevalov**
[Lesnoj, Rusio]

William Thorne [Britio]

Akuzativo indikas la celon!

el "K" 8-2001

*Gramatikaj
limerikoj*



Ŝerca portreto, kiun sendis al la redakcio W. Thorne

Artikolo

Por rusoj komplikas parolo

Kun uzo de "ia" - artikolo.

Sed sen tiu vort'

Ne klaras la sort'

Ĉu kapo situas sur (la) kolo?

Akuzativo

Kiam io fariĝas en ion

Ricevanto ricevas la "N"-on.

Ne gravas la ordoj

De aliaj vortoj,

Akuzativo indikas la celon!

Pronomoj

Sekrete mi diras al vi,

"Ŝi estas pli saĝa ol li".

Ni estas por ili

Ĉiam pretaj konsili

Sed ambaŭ ignoras je ĝi.

Adjektivo

Adjektivon ni tuj ekvidas

Per finaĵo "A" ĝi validas

Ĉu bela aŭ basa

Malgranda aŭ grasa

ĝi tian aferon priskribas

Adverbo

Rapide ni certe ekscias

Kiamaniere funkcias

"Amike parolas"

"Sincere ni volas"

E-sence ĉe l' fin' materias

Se vi kaj mi edziĝos

Kontentaj do ni estos.

Se li kaj ŝi kverelos

La viv' al ili kraĉos.

Ni helpu ilin, je la paco.

Perevalov Jurij [Lesnoj, Rusio]
el "K"-8-2001

Jurij Perevalov kolektis la vortojn, kiuj diferencas unu de la alia nur per unu litero-vokalo. Por oni ne eraru kaj misuzu ilin, li elpensis ŝercajn komentariojn kaj ilustris la aferon per humuraj bildetoj. Ni planas daŭrigi lian serion en la sekva jaro.




La litero "A" en la vorto "Aranĝo" aspektas kiel la plej simpla konstruo: ĝia trabo estas albatata per najloj.



La litero "O" en la vorto "Oranĝo" similas teleron, sur kiu vin atendas tri bongustaj oranĝoj.



Sur la "trabo" de la litero "A" en la vorto "Ardo" estas facile pendigi kaldronetojn. La manĝaĵo kuiriĝas per ardo de la fajro.



En la literon "O" de la vorto "Ordo" oni povas facile meti tri lampojn - verdan, flavan kaj ruĝan. La ordo sur la ŝoseo estas merito de la signallampoj!



En la fenestreto de la litero "A" en la vorto "Arta" oni povas pendigi belan bildon, kiu estas vera arto!



La litero "O" en la vorto "Orta" similas brulantan ringon, en kiun orte saltas tigroj en cirko.



Sur la "trabo" de la litero "A" en la vorto "Avo" sidas avo. La plej bona loko por ripozo!




La litero "O" en la vorto "Ovo" estas ovo, kiun oni kutime manĝas dum matenmanĝo.

Probal Dasgupta naskiĝis en urbo Kalkato, en lando Barato. Finis universitaton en Kalkato en 1973, doktoriĝis pri la lingvistiko en 1980 ĉe Novjorka Universitato. Dum pluraj jaroj instruis lingvistikon en diversaj urboj: Melburno, Kalkato, Puneo ktp. Honora memebro de la Lingvistika Societo de Usono ekde 2004. Membro de la Akademio de Esperanto ekde 1983 kaj ĝia vicprezidanto ekde 2001.

Prezidanto de UEA 2007-2010.

Verkas originale kaj aktive tradukas. Ĉefaj verkoj inkluzivas la esperantigojn "Primico" el Rabindronath Tagor, "Mi juna" el Manashi Das Gupta, "Klera edzino" de Upendronath Gangopaddhae en la serio "Oriente-Okcidento", "Dormanta hejmaro" el Manashi Das Gupta. Publikigis pli ol 300 artikolojn.



La verdiĝo de Probal

esperantigi poemojn de Rabindranth Tagore el la bengala kun la helpo de sia edzino. Sed li sendis donace ekzempleron de sia originala poemaro "Memkritiko" - kiu ludis la rolon de mia enkondukilo en la poezian modernismon.

Frue en 1968 mi aŭdis, ke en la urbeto Santiniketan (fondita de Rabindranath Tagore), 150 km norde de Kalkato, loĝas maljuna Esperanto-pioniro. Mi vizitis tiun s-ron Lakshmiswar Sinha kaj komencis avide legi lian 500-voluman bibliotekon. Inter la verkoj trovebaj ĉe li, la lernolibro de Vilho Setälä, "Privilegia vojo al la lingvoscio", kaptis mian atenton, kaj per ĝi mi ne nur plibonigis mian propran lingvoscion, sed ankaŭ instruis iom da Esperanto al mia lerneja kamarado Ashok - kiu partoprenis nur por komplezi al la amiko, kaj kiu tute klare montris mankon de interesiĝo pri la afero, sed tamen diligente atentis. En 1969 Sinha donacis sian kolekton al la Nacia Biblioteko de Barato en Kalkato. En 1970, inter mia abiturientiĝo kaj la universitato, mi katalogis tiun kolekton. Dum konversacioj kaj korespondo kun tiu pioniro Sinha, mi aŭdis ankaŭ pri la tradukoj, kiujn faras Sadler el la bengala.

En 1969, Sadler, kies kreskanta laborŝarĝo post transpreno de la direktoreco de la Centra Oficejo malebligis la kultivadon de la poezia ghardeno, persvadis min transpreni tiun taskon de li. Nur en 1974 mi liveris la manuskripton de "Primico" al la eldonisto, kaj nur en 1977 ĝi aperis. Fari kaj poluri tiujn tradukojn signifis korespondi kun Sadler kaj Sinha, sed ankaŭ kun Kalocsay, Waringhien, Auld. En 1977, dum mia studenta tempo en Nov-jorka Universitato, mi partoprenis la rejkvavikan UK. Tie William Auld diris al mi, ke li ne estis certa, ĉu la tradukoj montriĝos bonaj, sed ke, leginte ilin, li ŝatas ilin kaj verkas pozitivan recenzon. Lia recenzo - kaj mia septembra partopreno en la laboro redakti la kongresan numeron de la revuo - donis al mia laboro fruan kaj nemerititan reliefecon en la movado. Kontribuis al tio ankaŭ pli ampleksa pozitiva recenzo de Marjorie Boulton. En la postaj jaroj mi iusence pentofaras pro tiuj fruaj kaj tute nemerititaj reliefigoj; mi scias, ke kiom ajn da serioza laboro mi faras nun aŭ poste, mi neniam meritos ilin. Sed tiaj malekvilibroj en la Esperanta mondo donas unikan profilon al la infanaĝoj aŭ junaĝoj, kiujn tuŝas la verda lingvo: ni devas home reagi al la pasioj de aliaj, kaj el tio ni kreas ian sencon por ni kaj por la kunagantoj.

Dum la somera ferio de 1967, mi lernis Esperanton aŭtodidakte. Mi tiam estis lerneano en Kalkato - la ĉefurbo de Okcidenta Bengalando, gubernio en Barato. Tiu ĉi lerno sekvis serion da provoj lerni, per kiuj mi pasigadis la tempon post preskaŭ mortiga malsano en 1963-64. Mi tiamaniere lude provadis lerni la rusan, la ĉinan, la indonezian ktp, kaj kutime rezignis post kelkaj monatoj por papilie transiri al la posta ludobjekto. Pri Esperanto estis embarase, ke post du monatoj mi trovis min jam kapabla uzi la lingvon, se nur elemente kaj kelkterene, sed tamen vere uzi la lingvon por esprimi miajn ideojn.

Mi tial kontaktis la britan landan asocion, kiu konatigis min kun la landa asocio de Barato. Komprenoble mi aliĝis al tiu landa asocio - tiutempe temis pri "Hinda Instituto de Esperanto", fondita en 1962 pro klopodoj de Madeleine Haudebine en Delhio ekde 1959. HIE metis min en la reton de Koresponda Servo Mondskala kaj sendis al mi provekzempleron de la revuo "Esperanto". Mi ekkorespondis kun aliaj gejunuloj pere de KSM kaj ankaŭ aliĝis al UEA. La tiama vicdirektoro de la Centra Oficejo, Victor Sadler, havis pro sia bengala edzino kontaktojn kun Kalkato, kaj aranĝis, ke mi pagu al lia bofrato la prezon de "Plena vortaro", kiun mi tiamaniere akiris. Mi tiam ne sciis, ke Sadler antaŭ kelkaj jaroj komencis

Karaj legantoj! Ni ĝojas, ke en tiu ĉi numero de "K", kiu kronas la dekjaran eldonperiodon, ni povas prezenti al vi interesegan personon kaj honoran gaston de nia tradicia rubriko, novelektitan prezidanton de UEA Probal Dasgupta. Li estis tre kompleza kaj, malgraŭ la troa okupiteco, skribis por "K" laŭ nia peto. Kiel kutime vi povas konatiĝi ne nur kun la historio de lia esperantistiĝo, sed ankaŭ legi liajn originalajn poemojn.

la red.

Probal Dasgupta

Eksklasike

Pasis tagmez'. Vesper' eventis.
 Konceptoj blinde diligentis
 pri nova interpreto de
 furiozanta arane',
 kies benado ĉiun volvas.
 Dubaron malimplike solvas
 tempo kaj spaco eksklasikaj.
 Precipoj hontas, for.

Laŭ vi kaj
 samkamenanoj, por
 remagiigo de l' honor'
 devas la malprivilegio
 rehaŭti sin per senmetio.
 Laŭ vi, ne nepre venkos dignoj
 krom se silenton lernos signoj
 kaj banos nin mucido tera
 sen ajno, kio gvidu.

Ne la
 enhavo, sed la tonoj puraj
 de viaj certoj sensusuraj
 maltrankviligas. Kara, diru:
 ĉu mi nur la plejvastajn liru?
 1979

Leginte baratan journalon

Kun mokspontano el reklamaj fotoj
 Flamriĉa nubo sen petolo pozas.
 Panĝabaj rikoltantoj ja prognozas
 plusplenan jaron. Malgraŭ fuŝaj ĥotoj
 en la nordoriento, ni sukcesos
 trapaci, tamen. Ĵurnalistoj pesos
 ĉiuokaze nur la inflacion
 kaj ĉu ŝi dinastias. La nacion
 neniel eblas spekti ĉiuflanke.
 Oni teatras la ĉefurbon, manke
 de io, kio gravus sen insisto,
 kiel lacerto, aŭ popolkantisto.
 1980



En la rubriko vi povas legi ĉi foje kelkajn novajn poeziajn provojn de la aŭtoroj el Rusio, amuzan fabelon kiun esperantigis nia konstanta aŭtorino el Ffancio Ginette Martin kaj la priskribon de la vojaĝo al E-klubo, per kiu kontribuis Raita Pyhälä el Finnlando.


Nikolaj Neĉajev [Irkutsk, Rusio]

Vintra pejzaĝo

Ekstere ĉio grizas, blankas,
Koloroj ĝojaj vintre mankas.
Humoro mia same palas,
Melankolio aktualas.

Poeto en decembro

Poeta koro plenas
Je ĝoja romantiko.
Decembro ne katenas
Torenton de liriko.
Min ravas neĝo, steloj,
Atendo de Novjaro.
Anime versjuveloj
Ekfontas sen avaro.



Timur Halilov [Jekaterinburg, Rusio]

Belov Denis [Urupinsk, Rusio]

Noktaj pensoj

Nokto venis de la ĉielo
Kaj la luno helas pale
La meznokta tolo stela
Vokas min per nerealo.

Ĉielo, steloj estis ĉiam...
Granda estas la Kreinto!
Noktaj miraj pensoj miaj
Ĉiam laŭdas la Pentrinton.

Mi ne vidas apud steloj
Homojn, teron kaj la vanton,
Nur netera brilas helo,
De eternaj lumdonantoj.

Tera danco ne petolas
En stelnokta silentemo
Bru', susuro ne sonoras,
Restis nun nur la pensemo.

Restis nun nur malrealo
En silento mira, stela...
Kaj meznokta luno pala
Min kondukas al fabelo.

La kamelo kaj ĝia pulo

fabelo trovita en franca libro, esperantigita de Ginette Martin [Soulxures/Moselotte, Francio]

Estis kamelo, granda kiel ĉiuj kameloj. Ĝi kuris en dezerto, pensante pri fonto, pri folioj pli delikataj ol salatoj.

— Sed kio jukas min? Pulo!... pulo en la dezerto? Atendu iom, mi donos al vi bonan piedfrapon!

Kaj la kamelo piedfrapas... en la sablo.

La pulo alkroĉiĝas; ĝi grimpas.

—"Atendu iom, mi donos al vi bonan vostofrapon." La pulo ĵus saltis ĝis la kolo de la kamelo. Kaj la kamelo per la vosto frapas nur la aeron, aŭ kelkfoje sian dorson: "Aj! aj!"

Nun la pulo eniras en la oreton de la kamelo, jukas lin, pikas lin, kaj diras: "Estas mi la plej forta, mi, la tute malgranda besto!"

La kamelo rulas sin surtere, furioza: "Atendu iom, mi tretos vin."

Sed la pulo estas ĉe la fundo de la oreto, en ŝirmo, kie pli komfortas, ol en montara groto.

Kion faras la kamelo? Ĝi iras al la fonto, je la horo kiam la homoj venas por trinki; kaj ĝi renkontas homojn por la unua fojo. Ĝi ĉiam estis en granda timo pro la homoj, depost kiam ĝiaj gepatroj estis forprenitaj.

— Ĉu iu sinjoro bonvolos servi al mi, mortigante la pulon, kiu estas en mia oreto?

— Kion vi donos al mi? - diras unu el la homoj.

— Nu! La pulon.

— Mi ne estas simio por krakmanĝi la pulojn.

— Nu... unu kison.

— Mi ne estas infano por ŝati kisojn.

— Do ...palmfoliojn.

— Mi ne estas bovino por manĝi la foliojn, nek kamelo, kaj mi ne estas nigrulo por vesti min per ili.

— Do, kion vi volas?

— Rajdi sur vi.

— Sed vi falus.

— Ni ja vidos!

— Mortigu la pulon, kaj vi grimpos.

La kamelo surgenuiĝas, etendas sian oreton al la homo kaj diras al la pulo:

— Ĉu vi estas la plej forta, nune?

Antaŭ ol la pulo povas trovi tempon por respondi, la homo prenas ĝin inter du fingroj, per premo mortpistas ĝin.

— Hop! - krias la homo saltante sur la kamelon.

— Sed... kio jukas min denove? - diras baldaŭ la kamelo.

— Miaj propraj puloj, diras la homo.



Timur Halilov [Jekaterinburg, Rusio]

Mi sendas al vi priskribon pri mia maloŝta vojaĝo al mia E-klubo. Ĝi iom rivelas la vivkondiĉojn en la finna kamparo...

Raita Pyhälä [Finnlando]

Ne ĉiuj Esperanto-klubanoj loĝas proksime al la urbo, kie okazas la kunvenoj. Ili povas tien veturi eĉ ducent kilometrojn. Kompreneble la plej foraj membroj nur malofte vizitadas. Ni nun kunvojaĝu tra la finna kamparo kun unu el tiuj, kiuj loĝas plej fore.

Matene je la 7.30 la klubanino staras vojrande kaj atendas malgrandan aŭtobuson, kiu veturigas liceanojn al lernejo. Neĝetas kaj frostas, estas malhele; somere la buseto ne veturas kaj la klubo ne kunvenas. Fine aperas la lumoj de la buso, ĝi haltas, kaj la klubanino sidiĝas inter dormemaj ne parolemaj junaj liceanoj. Post trideko da kilometroj la klubanino ŝanĝas la buson je pli granda, kiu veturas 170 km al pli suda urbo Jyväskylä. Ankaŭ tiu buso unue tra la kamparo veturigas lernejanon, kiujn ĝi kolektas de hejmoj kaj bienoj dise en la arbaro. La vojoj estas mallarĝaj, glitaj, nerektaj, danĝeraj por la granda buso, kiu malrapide serpentumas. Jen kaj jen ĝi haltas, kiam staras vojrande etuloj, eble kun panjo aŭ paĉjo, kun lampoj en la manoj. Enbusiĝante geknaboj gaje salutas la ŝoforon. Ĉiun la gepatroj ameste vestis por la malvarma vojaĝo. Surdorse pezas jam grandaj dorsosakoj kun libroj, mapoj, skribiloj, kajeroj, eble eĉ amata ludilo. Ĉe sia lernejo la infanoj elbusiĝas, dirante "hej, hej" aŭ "hejp-pa", kiuj estas finnaj vortoj por interamika "ĝis revido".

Rapide ili kuras al siaj kamaradetoj en la korto, kiun prilumas fortaj lampoj sur altaj fostoĵoj. Enbusiĝas maljunulinoj. Ili veturos al vendejo, kuracisto aŭ geamikoj. Ili estas diketaj, malaltaj, sufiĉe parolemaj. Multaj el ili loĝas solaj en siaj dometoj aŭ apartamentoj kaj bezonas kompanion. Envenas ankaŭ senlaboruloj, malbone vestitaj kaj odorantaj je tabako.


Vojaĝo al klubkunveno

En la buso oni ne rajtas fumi. Post ili venas ĉifonulo, kun moneroj en sia tremanta ruĝa manego; poste drinkulo, kiu odoretas je piso kaj parolas al si mem aŭ al imagitaj samsortanoj. Ĉe alia haltejo atendas eleganta sinjoro en nigraj pelto kaj ĉapelo, kun granda leda valizo, kiun la ŝoforo helpeme metas en kofron sub la buso. Mallaŭta muziko kaj novaĵoj alternas en la radio. La ŝoforo respondas kelkajn vokojn de sia poŝtelefono. Ekstere daŭre neĝas, la flokoj sur la ŝultroj kaj kapo de la envenintoj degelas. La plejparto el la pasaĝeroj duondormas, iu ronkas jam. Dum kelkminutaj paŭzoj kelkaj el ili elbusiĝas por fumi aŭ kafumi, viziti necesojn. Malrapide plilumiĝas la pejzaĝoj. Ne multas aŭtoj survoje.

Post tri-hora veturado ni atingas la urbon Jyväskylä, kie aktivis Esperanto-klubo kelkdek-membra. La kunveno komenciĝos nur posttagmeze. Nun restas tempo por piediri strate, rigardi fenestrojn, viziti muzeon kaj restoracion, butikumi, legi gazetojn en biblioteko, uzi Interreton en la klubejo.

Kelkaj pasaĝeroj hastas al la fervoja stacio, kelkaj aliaj al kliniko aŭ al hejmo de parenco. Ĉiu havas sian farendaĵon. La ĉifonulo kaj drinkulo ne venis al la urbo. Ili elbusiĝis en iu malgranda vilaĝo. La esperantistino ĝojas pri renkontiĝo kun samklubanoj.

Ili refreŝiĝas sin per interparolado en internacia lingvo, per ridetoj, brakumoj, teo, kafo, kukoj. Feliĉe ŝi estas pensiulo, kiu havas tempon, kaj povas tranokti ĉe samideanoj. La sekva buso hejmen iros nur morgaŭ. La sekva vizito al la klubo okazos nur post monatoj.




Ŝulepov Vladimir [Verhoturje. Rusio]

Ni daŭrigas publikadon de gramatikaj lecionoj de J-L Tortel, kiuj baziĝas sur analizo de Zamenhofaj proverboj. Ĉar la numero estas unuigita, vi trovos ĉi-tie du lecionojn (aŭ babiladojn, kiel nomas ilin la aŭtoro mem).

Diligentan studon!

Gramatika leciono № 14



Saluton, geamikoj!

De la komenco de niaj babiladoj, ni tre ofte uzis la prepozicion de. Prepozicio (Babilado n° 2) estas vorteto, kiu indikas la rolon de la sekvanta alia vorto aŭ grupo da vortoj. Pro tiu rolo PMEG nomas ĝin rolvorteto (rol-vort-eto)

De bona vorto lango ne doloras (284)

Tio signifas: *Ni estu ĝentilaj!* Ni povus diri: *Per bona vorto.*

De edziĝo tro malfrua orfoj naskiĝas (285) = Pro edziĝo.

De kiu la kulpo, por tiu la puno (292)

= Kies kulpo, ties puno.

De kantado senpaga doloras la gorĝo (290) = Post, aŭ pro.

Tio signifas: *Ĉiu laboro meritas salajron*; ni povus diri: *Post ĉiu laboro ja venu la oro*; ĉi tie **de** = post.

Ni povus longe daŭr-igi; **de** havas multon, eble tro multon da sencoj. Ni legu "**de**" en PIV aŭ en PMEG. Sed tio ne devas tim-igi nin: ni ĝenerale facile ĝin komprenas kaj instinkte scias uzi. Tamen se estas risko de troa ripeto aŭ de hezito, ni ŝanĝu al alia rolvorteto. Ekzemple:

La traduko de Zamenhof de "Hamlet" de *Shakespeare* pli belas: La traduko fare de Zamenhof el "Hamlet" de *Shakespeare*.

Sed tio estas malofta kazo. Ni bone memoru, ke **de** ofte montras la faranton, la aganton; ni komencantoj ne forgesu tion. **Fare de** (aŭ **eĉ far**) estas malofte bezonataj.

Ni uzis: el Hamlet. El ĝenerale indikas la deirpunkton (de-ir-punkto):

Ne gutas mielo el la ĉielo (1659) aŭ:

Eĉ el sub la tero aperas la vero (400)

Sed ĝi ankaŭ indikas la materialon; ni scias, ke *Salvador Dali* pentris horloĝon el kaŭĉuko! Aŭ:

Li eĉ el sablo vipojn tordas (1320): Li estas lertulo, ĉu ne? Aŭ:

Ne batalu pot' el tero kontraŭ kaldrono el fero (1594).

Ni jam vidis (en la 4a babilado):

Ĝi estas por mi Volapukaĵo (691). -aĵo indikas objekton aŭ konkretan aferon:

Tolaĵon malpuran lavu en la domo (2437)

Ĉasaĵo ĉasanton ne atendas (212)

Fluidaĵo sen difino, nek vinagro nek vino (607)

Aĵo ankaŭ indikas manĝon: fiŝo, porko, bovo estas vivantaj bestoj; fiŝaĵo, porkaĵo, bovaĵo estas ties viandoj en niaj teleroj; nur ŝarkoj manĝas fiŝojn kaj tigroj porkojn aŭ bovojn!

Alia diferenco: ni homoj manĝas per manĝiloj! -il indikas instrumenton, aparaton:

Ora ŝlosilo ĉion malfermas (1840)

Ilo el oro taŭgas por ĉiu laboro (750)

Ne iru fadeno antaŭ kudrilo (1670)

Sed ni memoru:

- tio estas malfacilaĵeto (mal-facil-aĵ-eto) en Esperanto por ni komencantoj

- ke multaj vortoj de la lingvo havas propran finon en il, kiu ne indikas instrumenton: babil-, util-, facil-
Ni lernas ilin iom post iom, uzante ilin:

Ne timu tranĉilon, timu babilon (1749)

Post morto kuracilo jam estas sen utilo (2068)

Finite por hodiaŭ, ĉar:

De tro multa scio krevas la kranio (321)!

Ĝis!

Gramatika leciono № 15

Kia greno, tia pano (837)

facile kompren-ebla, kaj ankaŭ adapt-ebla al homoj!

Ĉiu "tial" havas sian "kial" (273)

= ĉiu konsekvenco havas sian kaŭzon. Sen la cit-iloj (") ni devus diri kialon; sed la citiloj faras kun iliaj internaj cit-aĵoj blokon, kaj post tiuj: ", oni ne metas literojn, do oni ne metas -on.

Kiam sako mizeras, (tiam) amo malaperas (855)

Fakte la proverbo ne en-tenas tiam, sed ĝi tute bone povus enteni ĝin.

Kie regas la forto, tie rajto silentas (894)

Kia, kial, kiam, kie... Tia, tial, tiam, tie... Tiuj vortoj apartenas al la "tabel-vortoj", arte-far-it-aĵo de Zamenhof por facil-igi nian memor-adon. Kiam oni komprenis, kiel tio funkcias, la uzado estas tre simpla.

La plej bona metodo prezenti la aferon estas desegni sur paper-folio cirklon per cirkelo (rondon per rond-ilo, aŭ per fundo de botelo!). Tio estas "horloĝo".

Ĉe la centro ni skribu "I". Ĉe la horo 11: 00 ni skribu "Ĉ"; ĉe la 10: 00 "K"; ĉe la 09: 00 "O" kun tra-streko (aŭ eĉ nenion se nia etna lingvo jam havas tiun literon: tio estus ĝena); ĉe la 08: 00 "NEN"; ĉe la 07: 00 "T".

Ĉe la horo 01:00 ni skribu "A"; ĉe 01:30 "AL"; ĉe 02:00 "AM"; ĉe 02:30 "E (N)"; ĉe 03:00 "EL"; ĉe 03:30 "ES"; ĉe 04:00 "O"; ĉe 04:30 "OM" kaj ĉe 05:00 "OM".

Nun apud Ĉ ni indikas ekzemple: tuta grupo; apud K: demand-ilo kaj rilat-ig-ilo; apud NEN: ne-ado; apud T: montr-ilo.

En la centro ĉe I: ne-preciz-eco.

Dekstre apud A ni notas: karakteriz-aĵo; apud AL: kaŭzo; apud AM: tempo; apud E (N): loko; apud EL: maniero; apud ES: posedo; Apud O: aĵo ne-individu-ig-ebla; apud OM: kvanto kaj apud U: individuo (aĵo aŭ ulo).

Nun ni devas ekzerc-iĝi, de maldekstre dekstren, tra la centro I; ekzemple:

K I U = demando (aŭ rilato) + individuo;

NEN I EL = ne-ado de maniero = en nenia maniero;

I AL = pro iu nepreciza kaŭzo;

Ĉ I E N = en ĉiun direkton;

T I AM = en tiu tempo...

Ni devas trankvile fabriki kaj traduki en niajn etnajn lingvojn la 5 x 9 = 45 tabel-vortojn. Poste ni pripensu: ĉu pli bone kompreni la Zamenhofan sistemon, aŭ papage memori 45 sen-rilatajn ne-konatajn vortojn?

Tamen trov-iĝis homoj, precipe lingvistoj, por konsideri la Zamenhofan el-trov-aĵon ne-akceptebla, ne "natura" ĉar ne simila al la etnaj lingvoj. Tiuj ofte havas por tiaj signifoj vortojn, kiuj prezentas nenian rilaton — aŭ malmultan rilaton — inter si.

Ekz.: Tia > tal; tial > igitur; tiam > tunc...

Sen-kulp-ige al tiuj lingvistoj, oni devas diri, ke ili ĝenerale kopiis la latinan sistemon, kaj ke en la unua duono de la 20a jarcento latino estis ankoraŭ tre vaste lernata en Eŭropo.

Sed tiu lernado nun iĝis maloŭta, kaj la internacia lingvo almenaŭ tiel (se ne pli) uzata en Azio, de lingvanoj tute fremdaj al la latino. Tio plene prav-igas la eltrovon de Zamenhof.

*Ĝis la venonta babil-ado!
Jan-Luk' Tortel*



El la vivsperto de unu patrino

Esperantigis Tatjana Vŝivceva
[Miass, Rusio]

La voĉo de 3-jara infano en plen-plena restoracio sonas pli laŭte, ol voĉoj de 200 plenaĝuloj.

*

Se vi aŭdas lirlon de neceseja akvo kaj eksklamacion: "Ho, diable!" — jam nenion eblas fari.

*

Pli bone ne serĉu kialon de tiu ĉi odoro.

*

Sesjarulo kapablas bruligi fajron per siliko, 36-jara homo opinias, ke tio eblas nur en filmoj.

*

Ne eblas fari bonan paraŝuton el rubaĵsaketoj.

*

Ĉiam kontrolu enhavon de via bakforno antaŭ ol ŝalti ĝin. Plastaj ludiloj ne ŝatas ŝaltitajn bakfornojn.

*

Vitraj globetoj, estante en la benzinujo de aŭto kaŭzas certan bruon dum veturado.

*

Funkcianta centrifugilo de lavmaŝino ne rezultigas kapturniĝon ĉe lumbrikoj.

Tatjana Vŝivceva [Miass, Rusio]

Pedagogie...

En 1-a klaso de lernejo instruistino laŭte legas por gelemnantoj fabelon pri porkido, kiu intencis konstrui por si dometon. Post la momento, kiam la porkido prenas ĉareton, venas en vilaĝon kaj petas ĉe unu kamparano iom da fojno por sia dometo, la instruistino ĉesas la legadon kaj demandas la gelemnantojn:

— Kiel vi opinias, kion diris la kamparano?

Ekstaras unu knabo kaj respondas:

— Mi opinias, ke li diris: “Diabla!!! Parolanta porkaĉo!”

Bildon kaj anekdotojn sendis

Artur Hismatullin [Novotroick, Rusio]

Ĉe kuracisto

Kuracisto demandas knabeton dum medicina esplorado:

— *Vovoĉka*, ĉu estas iuj plendoj pri la nazo kaj oreloj?

— Jes! Ili malhelpas min, vesti T-ĉemizon...

*

Danĝera sporto

— Ĉu vi scias, kio estas la plej ekstrem-danĝera speco de sporto?

— Ne.


— Tio estas naĝi laŭ montara rivero en montaraj skioj per montara biciklo!

*

Patro demandas la filon ĉe tagmanĝo:

— Fileto mia, ĉu vi lavis la manojn?

— Jes, Paĉjo, ankoraŭ hieraŭ!!!



Kolektis kaj esperantigis Makarenko Vladimir [Tverj, Rusio]

Logika ĉeno

— Ĉu vi scias, kial estas tiom multaj aŭtaj akcidentoj sur ŝosejo?

— Ne.

— Ĉar hodiaŭaj ŝoforoj kun morgaŭa rapideco veturas sur hieraŭaj vojoj.

*

Kurtaj tagoj

— Kial vi nenion faras?

— Nun estas vintro, tagoj estas tiom kurtaj, ke nenion eblas eĉ komenci...

*

Fanfarono

Futbalisto fanfaronas al sia edzino:

— Hodiaŭ mi enbatis du golojn!

— Vi estas bravulo! Kia estis rezulto de la ludo?

— 1:1...

*

Du amikoj babilas

— Kial vi tiel ŝatas viziti futbalon?

— Mi ne scias, eble kutimiĝis...

— Sed mi scias! Hejme al mi kriaĉas la edzino, en la oficejo - la ĉefo. Sed en la futbalo - mi kriaĉas al ĉiuj!

*

Estas bone...

Profesoro legas sciencan projekton de sia kolego kaj murmuris:

— Bone, bone, tre bone...

— Ĉu vere estas bone? - demandas lin la kolego.

— Bone, ke tion verkis ne mi.

*

Hipokritoj

Kiom malbonas hipokrituloj. Oni ilin mensogas, sed ili ŝajnigas, ke kredas...

*

Trafa prognozo

Pli proksime al la vespero veterprognostoj promesas malheliĝon de la tago...

*

Reklamo

Se vi aĉetos ĉe ni unu objekton kontraŭ prezo de tri — la duan vi ricevos senpage!

*

Ĉe psikiatro

— Kara doktoro. Mi al ĉiuj simple tiel disdonas monon.

Jen, ankaŭ al vi mi volas doni paron da stokoj...

— Fin-fine venis la unua normala paciento!

Anoncetoj Informoj Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj kaj 2 eŭrojn por ĉiuj ceteraj. Por abonantoj de "K" - senpage.

Mi estas 20 jara studento de fiziko kaj matematiko. Int: badmintono, ŝako, muziko, vojaĝoj. Mi volus kor. kun junuloj 15-25 j. por ekkoni aliajn kulturojn.

s-ro *Romain Parriax*
44 rue des Valendons.
21000 Dijon

Francio

roro-p@hotmail.fr

Mi estas 21 jara virino, progresanta. Mi estas studentino. Int: teatro, geamiko, lingvoj, poŝtmarkoj.

s-ino *Arkaeva Tanya*
Taŝkent.

Uzbekio

cool-arta@yandex.ru

Mi estas 21 jara studentino, komencanto. Intereso: libroj, filmoj, muzikoj, kulturo.

Monika Buczynska

ul. Morelowa 7a
Zielona Gora, 65-434

Pollando

medetrina@o2.pl

Mi estas 75 jara, emerito, ankoraŭ mense kurioza. Mi eklemis Esperanton antaŭ tri jaroj, nun mi instruas ĝin. Mi ŝatas foti, legi, vojaĝi.

s-ro *Gabriel Quere*
2 rue de la Fontaine Blanche
29800 Landerneau

Francio

gabriel.quere@wanadoo.fr

Mi estas 19-jara fraŭlo, meznivela esperantisto. Mi studas Juron en la Universitato de Bologna. Int: politiko, lingvoj, kulturoj, poezio, muziko, pentraro, verki, legi, vojaĝi, historio, filozofio, humuro, piedpilko, strangajoj. Mi serĉas interes-vekajn homojn, samaĝajn aŭ ne, kun kiuj eblas korespondi amuze kaj frukto-done.

Victor Manuel
MACHAS CARO
Montevideo, 6. 4c A
CP. 21005 - Huelva

Hispanio

vmmcaro@ono.com

Mi estas 20-jara. Muziko estas mia pasio. Mi ludas la organon kaj la fortepianon kaj kantas en du ĥoroj. Mi amas esti en la naturo. Ankaŭ mi amas francajn filmojn, lerni lingvojn.

s-ro Manuel Singer
Winterthur.

Svislando

mirdan@gmx.ch

Mi estas 63-j, komencanto. Mi ŝatas bicikli, ĝardeni, ludi akordeonon.

s-ro *Risselin Willy*
Marais de ghoy 1f
7860 Lessines.

Belgio

wilcjo356@skynet.be

Izmajlova Luiza [Kuzneck, Rusio]



Mi estas 43 jara virino, meznivela esperantisto. Mi estas flegisto en hospitalo. Mi ĝuas lerni novajn lingvojn kaj ĝenerale lerni novajn aferojn. Plaĉas al mi legado (multaj tipoj de libroj, precipe mistero kaj fantazio), kantado kaj muziko, pentrado kaj desegnado, naturo kaj bestoj.

s-ino *Min Penn*
Utah

Usono

goldmin22@hotmail.com

Mi estas 60 jara, de nelonge pensiulo (mi estis impostokolektisto), eklemis Esperanton per Rena Esperanto Klubo. Int: ĝardenado, ekologio, agrikulturaj problemoj. En aliaj landoj mi ankaŭ ŝatas viziti la pentraj-muzeojn.

Joseph Michaud
96 rue de la Croix Herpin
F35700, Rennes,

Francio

jmt.michaud@wanadoo.fr

Mi estas 27 jara viro, meznivela esperantisto. Int: interkomunikado, psikologio, ĝoja filozofio, manĝaĵoj, lingvoj. Mi ankaŭ ŝatas sporton. Mi serĉas geamikojn tutmonde.

Aleksej Ivanov
Egerskij bulvar 45-285
u. Cheboksari
427000

Rusio

aleksej_i@mail.ru

Mi estas 21 jara studentino de filozofio kaj meznivela esp-isto. Int: filozofio, religio, politiko, naturo, libroj kaj kulturoj. Mi preferas paperpoŝton.

s-ino *Dawn Eschenauer*
0445 CR 28, Corunna,
Indiana 46730

Usono

risingun3@yahoo.com

Mi estas 45 jara komercisto. Antaŭ 20 jaroj mi eklemis Esperanton. Min interesas vojaĝado, amikeco, trinki teon, internaciaj komercaj aferoj. Ĉirkaŭ nia urbo troviĝas pandoj. Mi volas korespondi kun samaĝuloj per retroŝto. Mi ankaŭ volas helpi miajn junajn leantojn korespondi kun alilandaj junaj esperantistoj.

s-ro *Xiao Fujun*
Chengdu

Ĉinio

grupoyema@hotmail.com

Mi estas 25 jara viro el Italio, komencanta esperantisto. Mi loĝas en Pistoia, toskana urbeto apud Florenco.

Mi volus konrespondi tutmonde kun 18-35 jaraĝaj geamikoj. Int: kulturoj kaj landoj, lingvoj, aktiva civitaneco, historio, vojaĝi, komunikado kaj komunikiloj, kino, monda muziko, alternativa rock-muziko, acida jazo, kantado, futbalo, Tolkien, bildrakontoj italaj kaj japanaj.

Andrea Ticca
via Dalmazia 401/B
51100 Pistoia

Italio

esperandrea@yahoo.it

komencanto@r66.ru

viaj mesaĝoj, verkoj kaj leteroj estas ĉiam bonvenaj!

